



# Argenta Filiko

ISSN 1176-418X  
6-monata Bulteno  
de Nov-Zelanda  
Esperanto-Asocio

Revuo por membroj de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Septembro 2014

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, PO Box 8140, Auckland 1150

Telefono: 0800 350 781

Retadreso: [info@esperanto.org.nz](mailto:info@esperanto.org.nz)

## Melburno invitas vin!

La Nov-Zelanda kaj Aŭstralia Esperanto-Asocioj invitas vin al kuna kongreso kaj somerlernejo en januaro 2015. La unua evento estos vespermanĝo je vendredo, la 2-a de januaro, kaj la lasta evento estos matenmanĝo je dimanĉo, la 11-a de januaro.

La enhaviĉa programo proponas Esperanto-kursojn je tri niveloj, kunajn ekskursojn, prelegojn, kaj diversajn distrajn eventojn kiel teatraĵojn aŭ eĉ diskotekon. La fina bankedo okazos dum la vespero de la 10-a de januaro.

Por membroj de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA), nia jarkunsido ankaŭ okazos en Melburno (sabaton la 10-an de januaro je la 9:00 matene, kio estas 11:00 en Nov-Zelando). Se vi ne povos ĉeesti la kongreson persone, bonvolu konsideri ĉeeston per interreta sistemo kiel Skype. Ni bezonas certan minimuman nombron por voĉdoni, kaj homoj kiuj partoprenos interrete aŭ telefone certe rajtos voĉdoni. Poste ni sendos pliajn informojn pri la jarkunsido kaj raportojn.

Bonvolu viziti la retpaĝon [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au) por aldonaj informoj inkluzive kiel aliĝi al la kongreso kaj somerlernejo.

Mi esperas vidi vin tie!

Chris Krägeloh  
Prezidanto de NZEA

The next AGM of the New Zealand Esperanto Association will take place at 9am (Australian Eastern Daylight time) on 10 January 2015 at International House, Melbourne University, Australia.

## Financa subteno por la kongreso

Ĉu vi volas ĉeesti la kongreson kaj ĉu mono ne sufiĉas? Ne maltrankviliĝu! La financa stato de NZEA estas bona kaj ni volas proponi financan subtenon se necesas. Se vi volas demandi pri ĉi tiu ebleco, bonvolu kontakti nian kasiston, David Ryan ĉe [david@nzea.org.nz](mailto:david@nzea.org.nz).

## Multaj libroj kaj gazetoj

En la pasinta numero de *Arĝenta Filiko* ni menciis ke NZEA ricevis preskaŭ 60 skatolojn da libroj kaj gazetoj ktp post la forpaso de Gwenda Sutton. Feliĉe nun restas nur kvar skatoloj. Ni sukcese sendis librojn kaj gazetojn al kluboj, komencantoj, kaj kolektantoj en pli ol 10 landoj. Tamen, ankoraŭ restas multaj libroj kaj gazetoj, kiujn ni volonte sendos al vi senpage. Petu liston al david@nzea.org.nz.

## Nia revuo, *Esperanto sub la Suda Kruco* (ESK)

Eble vi rimarkis dum la jaro ke ESK aperis neregule. ESK estas nia kuna revuo kun la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Oni redaktas ĝin en Nov-Zelando kaj aliaj personoj faras la formatan taskon en Aŭstralio. Okazis problemoj pri la formatado tie. Tamen, nun nova persono transprenis la formatan taskon kaj ESK denove aperos regule. Fakte, la septembra numero estas preta kaj ĝi baldaŭ survojos al vi.

ESK dependas de la kontribuoj de niaj membroj. Vi rajtas sendi artikolon en Esperanto aŭ en la angla pri iu ajn temo. La adreso kaj limdato por kontribuoj aperos en la venonta numero. Simile, se vi volas kontribui al *Arĝenta Filiko*, bonvolu sendi artikolon!



Bela Melburno, nia kongresa urbo por 2015

## Nia kongresa urbo por 2016 ... Auckand

Nia kongreso en 2016 okazos en Auckland. Samtempe, ni organizos internacian kongreson pri interlingvistiko al kiu ni intencas inviti elstarulojn de nia internacia movado. Ni ankoraŭ ne decidis pri la dato, sed plej verŝajne kiel kutime en januaro aŭ februaro. Poste detaloj sekvos.